

Bulgara **ESPERANTISTO**



ENHAVO

	Paĝo
Zahari Ivanov. La nova 1969/70 lernoĵaro — je pli alta nivelo kun pli bonaj rezultoj!	1
St. C. Daskalov. El la romano „Tera lumo“	3
D-ro L. L. Zamenhof. El juĝeja kroniko	5
Venelin Mitev. Cvetan Spasov	6
David Ovadia. Al k-do Nedelĉo Nedelĉev — Ĵan	8
* * * Penka Miĥajlova	8
* * * Al 4000 abonantoj de „Bulgara Esperantisto“!	10
Rosica Georgieva, L. Karakaŝev. Organiza vivo	10
* * * Tra la E-mondo	11
Werner Plate. Bulgario forte impresis min	11
Atanas D. Atanasov. Pekoj kontraŭ la sintakso	12
Miĥail Ĉobanov. Galunka	15
Ljudmila Jevsejeva. Mi ne estas el sukero	17

Sur la kovrilpaĝo:

La verda standardo flirtas ĉe montodomo „Studenec“ en Pamporovo. Parto de la gekursanoj el la duagradaĵ kursoj kun siaj gvidantoj K. Vălev kaj G. Dimov.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liraj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane. es

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Miĥail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva, M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



LA NOVA 1969/70 LERNOJARO — JE PLI ALTA NIVelo KUN PLI BONAJ REZULTOJ!

Dum la jubilea 25-a jaro de la socialisma revolucio en nia lando ni atingis novajn, notindajn sukcesojn en la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto. Multloke estis organizitaj E-kursoj por laboruloj en entrepreno kaj oficejoj, por lernantoj el ĉiuj gradoj de lernejoj, por instruistoj. Krom tio Esperanto estis oficiale fakultative instruata en kelkaj fundamentaj kaj mezaj lernejoj en la distriktoj de Miĥajlovgrad, Vraca, Kjustendil, Blagoevgrad, Tolbuhin k. a., ankaŭ en Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ kaj en la superaj ekonomiaj institutoj en Varna kaj Svištov.

Jen la konkretaj rezultoj de la instruado de Esperanto en lernejoj:

- 1. Universitato kaj superaj institutoj — 17 kursoj kun 302 gestudentoj.*
- 2. Instruistaj institutoj — 2 kursoj kun 46 gestudentoj.*
- 3. Mezlernejoj — 65 kursoj kun 1437 gelernantoj (el ili 35 kursoj kun 803 gelernantoj en teknikuoj).*
- 4. Fundamentaj lernejoj (V—VIII klasoj) 23 kursoj kun 378 gelernantoj.*
- 5. Elementaj lernejoj — 9 kun 143 gelernantoj.*

Entute en lernejoj ĉe ni dum la pasinta lernojaro funkciis 116 kursoj de Esperanto kun 2306 gelernantoj. Kompreneble, la informoj ne estas kompletaj — tiaj mankas pri kelkaj lokoj. Mankas ĝustaj informoj ankaŭ pri la kursoj, organizitaj ekster lernejoj.

Dum la jaro organizis kursojn ankaŭ kelkaj distriktaj komitatoj de nia Asocio: Sofia, Ŝumen, Varna k.a.—en distrikta skalo, Smoljan—en internacia skalo,

Specialan atenton meritas la tute nova, originala iniciato de la Sofia DK. Por venki la ĝisnunan postrestadon de E-Movado en la distrikto, DK de BEA en Sofio — kun la morala kaj materiala helpo de Distrikta Popola Soveto (resp. fako „Popola Instruado“), de DK de Asocio de Bulgaraj Instruistoj kaj la Instruista Sekcio de BEA, organizis sisteman laboron kun pli ol 100 geïnstruistoj —komence miksita kurso (foresta-ĉeesta), poste, dum la somero — nur ĉeesta kurso. La celo estis: prepari E-instruistojn por Sofia Distrikto el profesiaj instruistoj.

Tiu ĉi nova formo de preparo de E-instruistoj montriĝis tre rezultodona kaj oportuna por ĉiuj instruistoj. La iniciato de DK — Sofia daŭros ankaŭ en la nova jaro kaj ĝi fariĝos konstanta kaj tutlanda. Tio estas certa vojo prepari E-instruistojn ĉe ni.

La nova lernojaro en niaj lernejoj komenciĝas post la gravaj decidoj de la lasta Plenkunsido de CK de BKP pri la instruado kaj edukado de la juna generacio. Tiuj decidoj tuŝas ankaŭ la instruadon de Esperanto — ĉu en, ĉu ekster lernejoj.

Antaŭ ni staras gravaj taskoj.

La distriktaj E-komitatoj devas analizi profunde la instruadon de Esperanto sur sia teritorio, fari la necesajn konkludojn kaj antaŭvidi efikajn iniciatojn kaj rimedojn por disvastigo kaj plibonigo de l' E-instruado. Multan atenton oni dediĉu al organizado de duagrada kaj superaj kursoj kaj formoj de perfektigado. Ĉiujare la amplekso de l' Esperanto-instruado devas esti pli vasta, ĝiaj organiza kaj metodika niveloj — pli altaj.

La distriktaj komitatoj devas bone pritaksi ankaŭ la agadon de la E-instruistoj kaj kursgvidantoj en la distriktoj kaj plani iniciatojn por ilia refreŝigo kaj plua perfektigo en la lingvo.

La distriktaj komitatoj kontaktigu kun la distriktaj fakoj „Popola Instruado“ kaj la distriktaj komitatoj de Asocio de Bulgaraj Instruistoj kaj organizu fakultativan instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj, kie jam estas pretaj E-instruistoj. Sed oni sufiĉe bone atentu pri la nivelo de ĉiu aparta E-instruisto por ne kompromiti la aferon iuloke.

Specialan zorgon la distriktaj komitatoj havu al la junularo. Oni organizu junulkursojn nepre kunlabore kun la komitatoj de Komsomolo.

La Instruista Sekcio de BEA helpu Sofian DK kaj aliajn DK por perfektigi la sistemon de miksitaj (foresta-ĉeesta) instruado de Esperanto por instruistoj kaj aliaj inteligentuloj. Ĝi prizorgu senpere kaj reale la kreon de novaj, bone preparitaj kaj kapablaj E-instruistoj en la tuta lando. Ĉi tion nun estas unu el la plej gravaj bezonoj kaj taskoj de nia Movado, kiu meritas maksimuman atenton.

La aliaj sekcioj de BEA ankaŭ agu en siaj fakoj kaj organizu E-kursojn laŭfakte kaj laŭprofesie.

Por havi bonan rezulton, la distriktaj komitatoj, la sekcioj de BEA kaj la estraroj de la E-societoj anticipe ĉiam bone esploru la kondiĉojn en ĉiu loko, bone preparu la grundon kaj nur tiam anoncu oficiale kurson. Tion ili atingos nur se ili ne agas solaj, sed kune kun la estraroj de aliaj organizaĵoj — politikaj, kulturaj, sportaj k. a., utiligante ankaŭ siajn kontaktojn kaj ligojn — ĉu oficajn, ĉu sociajn, ĉu personajn.

Specialan atenton oni turnu al la propagando de la kursoj per lokaj gazetaroj, radioretoj, kunvenoj, afiŝoj, murgazetoj, sloganoj, flugfolioj k. a. Por tiuj ĉi celoj oni elspezu ankaŭ monon — ĝi estos rehavita per la kursokotizoj kaj ĝenerale pravigita per la moralaj atingadoj de nia Movado. Sed ĉe la propagando oni neniam forgesu ankaŭ la individuan agitlaboron — ĝi estas ĉiam plej certa, plej konvinka. Tial oni starigu taskon antaŭ ĉiu societa membro varbi nepre almenaŭ 1—2 novajn kursanojn.

La Rezolucio de la 37-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna devigas ĉiun estraron — de CK, de DK, de ĉiu sekcio aŭ societo, — ĉiun apartan esperantiston fari ĉion eblan por decida plibonigo de la E-instruado kaj tiamaniere plimultigi la societajn membrojn kaj la tutan asocian membraron.

Al laboro! Al laŭplana, energia kaj sindona laboro por novaj, pliaj sukcesoj en la instruado de Esperanto, en la pligrandigo kaj refreŝigo de nia kara E-Movado!



Stojan C. Daskalov estas unu el la plej produktivaj nuntempaj bulgaraj verkistoj. Lia 60-a jaro lin trafas kiel aŭtoron de ĉirkaŭ 40 libroj. Li majstre pentras la vilaĝan vivon. Liaj unuaj libroj kun rakontoj („Sufero“ — 1935, „Veturilsulko“ — 1937, „Rokpinto de Magda“ — 1940, „Sub la kapoto“ — 1941, „Korto“ — 1943) estas dediĉitaj al la peza vivo de l' malriĉaj vilaĝanoj en kapitalisma Bulgario. Post la liberiĝo je 9. IX. 1944 Daskalov skribas pri la nova vivo en nia lando kaj pri la konstruado de la socialismo en la vilaĝo: „Ĉe la siaj“ — rakontoj (1946), „Novaj rakontoj“ (1947), „Sen dividsulko“ — rakontoj (1948), „La muelejo de Lipovanski“ — romano (1951), „Sia tero“ — romano (1952), „La tilioj de Stublen“ — romano (1960), „Kiam komenciĝas la amo“ — novelo (1961), „Soldatedzino“ — novelo (1961), „Vilaĝo apud uzino“ — romano (1963), „Spita homo“ — novelo (1963) k. a. La kontraŭfaŝisma batalo estas respegulita en lia romano „Vojo“ (en tri partoj — 1945, 1950 kaj 1954). Al Georgi Dimitrov li dediĉis rakontkolekton „La ok panoj“ (1962). Daskalov estas aŭtoro ankaŭ de multaj libroj por infanoj: „Gjoŝko al festivalo“ (1949), „La tintileto de Roguŝa“ (1955), „La knabo de la lasta benko“ (1963) k. a.

En 1950 li fariĝis laŭreato de Dimitrov-premio.

Pro liaj du lastaj romanoj — „Respubliko de la pluvoj“ (1967) kaj „Tera lumo“ (1968) Stojan C. Daskalov fariĝis duafoje laŭreato de Dimitrov-premio (en aŭgusto 1969).

Kiel ni jam informis niajn legantojn, (vidu № 7—8 de „BE“ j. k.) la ĉefa heroo de Daskalov en „Tera lumo“ estas esperantisto. Ĉi-sube ni donas fragmenton el tiu ĉi romano.



El la romano „TERA LUMO“

de Stojan C. Daskalov

La servisto el la vilaĝa komunumo alvokis Bratan ĝuste kiam li volis enŝovi la leteron en la poŝtkeston.

— Venu, la vilaĝestro deziras vidi vian insignon!

Bratan marŝis kaj pensis pri Nederlando: lia letero traflugos kiel birdo de sudo al nordo kaj forportos al lia nekonata amiko Van der Friz la ĝojon pro la printempo en lia vivo. . . Kiel li aspektas? Ordinara laboristo, nature, tion li komprenas de lia letero, sed verŝajne estas io, kio diferencigas lin. Eble Van der Friz estas blonda, kun bluaj okuloj. Norde ĉiuj estas blondaj kaj bluokulaj. Tiel oni skribas en la geografio, Bratan speciale legis pri Nedelando antaŭ ol skribi la

eteron! Kia estas tie la grundo, ĉu poroza, ĝardena aŭ ie — tie ŝtonhava? Se la maro leviĝos, ĉu ĝi ne surverŝos tiun landon-ĝardenon kaj ne forportos ĝin, se ne estas rokoj, kiuj gardus ĝin?

— Nu, diru al mi, kie vi perdiĝis? — komencis pridemandon la vilaĝestro. — Kaj kia estas ĉi tiu stelo, per kiu vi ornamis vin? Oni diris, ke ĝi estas kvinpinta, sed ĝi diferencas de la bolŝevista.

— Tio estas la insigno de la esperantistoj.

— Kaj kion ĝi signifas?

— Ĉiu pinto havas sian signifon. Unu esprimas amikecon, alia — pacon...

— Kaj la aliaj tri — liberecon, fratecon kaj egalecon, ĉu ne?

— Jes, estas ankaŭ io simila. . . — nevole diris nesingardeme Bratan.

— Aŭdu, he, Bratan, se tiun ĉi insignon donis al vi la instruisto de historio, de verda ĝi fariĝos ruĝa. Alidirekten ĝi kondukos vin! Al komunismo, videble, vi tendencas! Pri frateco kaj egaleco vi parolaĉas!

— Ha, — rekonsciiĝis Bratan, — ne tiaj frateco kaj egaleco, pri kiuj vi pensas, politikaj, sed egaleco per la lingvo. Por Esperanto ŝtatlimoj ne ekzistas. Ĝi amikigas la tutan homaron.

— Ja tio estas la sama, vi mem diris la veron! Kion signifas: ke ne ekzistu limoj inter la ŝtatoj, ke la tuta homaro amikiĝu? Sed tio estas vera komunismo, Bratan. Por tio ĉi batalas ankaŭ niaj komunistoj ĉi tie, en la vilaĝo.

— Esperanto estas internacia lingvo! — respondis Bratan en Esperanto.

— Kion vi diris? Internacio, ĉu? Aŭdu, Bratan, vi ekkantos bonege la Internacion, se mi sendos vin en la policejon!

— Vi ne komprenis, kion mi diris en Esperanto: ĝi estas internacia lingvo. Pri nenia internacio mi parolas!

— Mi komprenas! Sed ĉio internacia estas malpermesata — tion vi mem

devas kompreni.

— Ne, Esperanto estas permesata. Demandu, kaj vi ekscios, ke ĝin parolas plej diversaj homoj en la tuta mondo.

— Ha, iuj povas ĝin paroli, sed ĉi tie mi malpermesas, ĉu vi aŭdas? Kaj forigu tiun ĉi insignon!

— Kial?

— Ĉar mi ĝin forigos kaj kune kun ĝi mi sendos ankaŭ vin, tiam vi komprenos la kialon.

— Sed al kiu ĝi malhelpas?

— Malhelpas, malhelpas. Neniu alia metis insignon sur la bruston, nur vi. Kaj pri frateco kaj libereco, sen ŝtatlimoj, pri diversaj internaciaj aferoj ne parolu plu.

— Kaj mi pensis, ke ni malfermos kurson de Esperanto ankaŭ ĉi tie, ke ankoraŭ da junuloj eklernos ĝin.

— Sidiĝu vi sur vian postaĵon, ĉar mi mem lernigos vin! . . . Nur grupojn vi ne faris ĝis nun. . .

— Sed la instruisto el la gimnazio Andreev venos, kaj tiam ni fondos la grupon.

— Se li alportos al mi leteron el „supre“, tiam eblas. Sen letero neniajn grupojn mi permesas! Ĉu vi komprenas?

— Kiam venos la instruisto, vi interkompreniĝos.

— Pri kio ni devas interkompreniĝi? Ankaŭ li estas erarigita kapo kiel vi. Ja oni eksigis lin kiel komuniston, kaj nun, ne povante agi alimaniere, li decidis fondi Esperanto-grupojn. Denove oni forpelos lin! He, vi prizorgu vian paŝtadon kaj forlasu la sciencojn, ĉar vi tute frenezigos.

— Ĉi-jare mi faros ekzamenon por du klasoj samtempe. Farinte la maturkzamenon, mi jam finos.

— Ŝajne, vi ne finos! Kia estas tiu ĉi letero?

— Letero al mia amiko, esperantisto.

— Ĉu li estas de Sovetunio? —



En la monata gazeto „Bocxod“ („Sunleviĝo“), eldonita en Sankt Petersburg de 1881 ĝis 1906, aperis en 1884, en numero 45, sur paĝo 1302, sub la rubriko „Semajna kroniko“ — poemo Zamenhofa, subskribita per la latina litero Z. La originalo aperis en

Interesa okazis proces',
Estis la akuzato nobelo:
Skribis plendo jakobo Kagan
Kontraŭ moŝta sinjoro Jagelo.

Preterpasis laŭdire Kagan
Kelkajn fojojn la domon sinjoran,
Pro koler', la sinjor' kontraŭ lin
Atakigis hundaron hororan.

„Kion diros vi?“ al la nobel'!
Turnis sin la juĝist' kun severo,
„Atakigi la homojn per hund'
Estas tute malleĝa afero!“

La motivo: „Akuzi ja mi
La nobelon Jagelon ne povas,
Li ne kulpas, ke lia hundar'
Judan korpon ŝatinda ne trovas!“

rusa lingvo, sub la titolo „Из судебной хроники (шутка)“. La disponigon de tiu forgesita verko ni dankas al la diligentaj esploroj de s-ro Adolf Holzhaus (Usono). La Esperanta traduko devenas el la plumo de Hilda Dresden (Estonujo).

„Kion diru mi? Jen la respond':
Mondpere' nin videble minacas,
Se nobelon nun oni pro jud'
En juĝejon alvoki aŭdacas! . . .

Atakigi — neniam bezon':
Miaj hundoj mem agas tiele,
Ĉe l' renkonto laŭ propra impuls'
Ĉiam judon atakas kruele!“

Ĉe l' juĝado decidis juĝist'
Fari al la nobelo komplezon,
Eĉ verdiktis, ke devas Kagan
Ankaŭ pagi juĝejan elspezon.

La vilaĝestro ekkaptis la leteron.

— Ja vi vidas — Nederlando! Nu, ni enskribu ankaŭ vin en la kurson de Esperanto, por ke vi povu kontroli niajn leterojn. Vi vidos, ke nenio danĝera estas en ili.

— Do, legu! Mi deziras aŭdi, kion vi skribis.

Bratan ne kolerigis, sed kun plezuro eklegis sian unuan leteron en tiu ĉi nova lingvo:

— Kara samideano, mi estas bulgaro. Mi vivas en vilaĝo Ponor. Mi studas, mi lernas kaj laboras. . .

— Atendu, atendu! Diru, kion ĝi signifas en bulgara lingvo.

— Neniam danĝero, sinjoro vilaĝestro. Mi skribas al li, ke mi estas bulgaro, ke mi vivas en vilaĝo, ke mi laboras kaj samtempe lernas.

— Tio estas klara, sed komence vi diris ion specialan. . . Atentu, ankaŭ

mi lernis francan lingvon unu jaron, kion vi pensas? Tie, en la komenco, estis io. . .

— Nu jes: kara samideano. . .

— Aha, ideano, tio estas ideano. Ideo, do. Denove vi montris, kia vi estas. Mi kaptis vin.

— Sed ja tiel ni nomas nin reciproke. Samideano signifas homo, kiu havas la saman ideon. Kiel mi povus adresi min al li, se ne per „kara samideano“?

— Do — denove grupo de samideanoj! — La vilaĝestro ektiris la leteron el la manoj de Bratan. — Ni vidos, ĉu tio ĉi atingos Nederlandon. Ni devas vidi ĝin en la polico, tiam.

Bratan forvelkis. Neniam li supozis, ke oni tiel krude estingos lian puran, virgan ĝojon.

El bulgara: Kunčo Válev

HEROA PASINTECO

CVETAN SPASOV

La varma aŭgusta sunsubiro trankvile falis sur Lozenec. La malriĉa ĉe-urba kvartalo pretiĝis ripozi jam post la longa kaj peza labortago, kiam de la centra strato aŭdiĝis krio kaj tute neordinara tumulto. El ĉiuj pordoj kaj fenestroj tuj montriĝis timigitaj infanoj kaj virinoj. Du policianoj kondukis junan



arestiton, minacis kaj blasfemis kaj ĉe ĉiu provo de la viktimo sin tiri aŭ protesti, punbatis lin per siaj bajonetoj.

— Honton vi ne havas!... — kriis maljuna virino. — Vidu — vera infano li estas, kaj ili batas lin. . .

— Vi, sendenta avinaĉo, ne babi-

laĉu plu, ĉar. . . vin ni ankaŭ povus preni, kaj tiam vi vidos, kiu estas prava — respondis al ŝi kolere unu el la policianoj.

— Ne rigardu, ke li estas juna — la alia diris. — Terura bandito li estas, jam tri monatojn ni serĉas lin.

La du policianoj kun la arestito tra-iris la straton kaj eniris la korton de la kazerno. Tie estis telefono kaj unu el ili deziris aŭdiĝi sin al la direktoro de la polico pri la sukcesa ĉaso kaj peti kamioneton por alveturigi la arestiton. La alia policano restis kun la viktimo. Pasis kelkaj minutoj. En iu tempo la ligita per ŝnuro junulo eksentis, ke la kaptilo ne estas tute solida. Momento, du. . . Per tute nevidebla movo li sukcesis eltiri unu el siaj manoj. Mankis tempo por mediti. La decido estis — nun aŭ neniam! La policano komencis bruligi cigaredon. Forta subita piedbato — kaj la arestito jam flugis tra la strato al la homamaso, flugis, kaj neniu sukcesis kapti lin. La policianoj komencis pafi. Senrezulte! Trans muroj kaj baroj, laŭ stratetoj kaj kortoj la arestito kvazaŭ sub la teron malaperis !

Tio estas fragmento el la biografio de la studento de juro Cvetaŭ Spasov. Ne, de la eksa studento; antaŭ tri monatoj li estis eksigita de la Universitato pro „komunista agado“.

Tio estas nur fragmento el la vivo de la juna, sed bone jam konata en la konspiraj medioj senlaca organizanto de la gejunuloj, talenta poeto kaj publicisto, aktiva propagandanto de la Internacia Lingvo Esperanto inter studentoj kaj laboristoj.

Kaj la tuta lia mallonga vivo estas senfina vico de similaj dramecaj eventoj. . .

Estis Cvetaŭ jam en sepa klaso de la gimnazio, kiam eksciis de iu konatulo, ke ekzistas en la mondo lingvo, sennacia kaj tute facila, per kiu homoj de diversaj landoj povas interkompre-



niĝi. Tiam, kiel lernanto de klasika gimnazio, tagon kaj nokton li bekis latinajn kazojn kaj konjugaciojn. Multe da tempo estis necesa por scii ĉion — li ja estis la plej bona lernanto en la klaso. Sed en tiu ĉi tempo Cvetan jam ligiĝis kun remsa grupo¹ en la urbo. Regule li komencis viziti ĝiajn kunvenojn, partopreni literaturajn vesperojn. Li komencis pensi pri la homo, pri la ekzisto, pri la senco de la vivo, pri la mizero kaj la riĉego. Kaj en lia juna cerbo komencis ŝvebi plej strangaj ideoj. Foje li, tute ne sciante pri la Internacia Lingvo, imagis, ke eble oni povus krei similan lingvon. Kaj ĉiuj homoj ekvivis en paco kaj interkompreno. „Ne, — li pensis pli malfrue, — nur la lingvo ne povus esti sufiĉa... Sed... ĝi povus havi bonan utilon...”

Kaj jen Cvetan eksciis, ke jam estas kreita tia lingvo. Iu konatulo diris al li, ke li povas viziti kurson de Esperanto. Senpaga ĝi estas — iu laboristo gvidas ĝin.

Kaj de tiu tago Cvetan estiĝis esperantisto. Kiom da ĝojo alportis al li la unuaj leteroj! Kiom multe da novaj amikoj li ekhavis! Post kelkaj monatoj Cvetan ne nur skribis leterojn kaj parolis, sed mem komencis verki versaĵojn en Esperanto. Pli ĝuste — traduki en Esperanton siajn bulgarlingvajn poemetojn, multaj el kiuj jam aperis en la lokaj gazetoj. Kaj kiam en septembro 1939 en Plevan okazis Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, li dediĉis al tiu ĉi grava pri la Movado evento specialan poemon — „Venu al Plevan“. Propran poemon, dediĉitan al Esperanto, deklamis Cvetan ankaŭ en granda kunveno de la esperantistoj en decembro 1940 okaze de la naskiĝtago de Zamenhof.

Sed Cvetan ne restis nur ĉe la literaturaj okupoj kaj la kunvenoj. En tiuj jaroj li konatiĝis ankaŭ kun kelkaj samideanoj-komunistoj kiel Slavi Aleksiev kaj Lenin Miŝev ekzemple.

Esperanto estis por ili jam ne nur lingva interkomprenilo, sed ankaŭ idea interkomprenilo, forta ligo inter iliaj revoj pri feliĉo kaj brila estonto de la tuta popolo.

... Venis la studentaj jaroj. Novaj amikoj, novaj konatuloj, novaj taskoj en la eksterleĝa komunista agado. Tagon kaj nokton legis la juna studento, precipe sovetajn poetojn kiel Blok kaj Majakovskij... Unu post la alia en la gazetoj kaj la revuoj komencis aperi liaj propraj poemoj kaj kritiknotoj. Eĉ burĝaj kritikistoj, pri kiuj la proleta literaturo estis stulta afero, devis konfesi, ke sur la literatura kampo paŝas jam nova freŝa talento, de kiu oni povas atendi multon.

Poste venis la eksigo el la Universitato, la forkuro el la polico, novaj konspiraj operacioj, persekutoj, mizero... Poste — denove en la naskiĝurbo, tra la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Kiel membro de la Distrikta Komitato de Laborista Junulara Unuiĝo Cvetan organizis konspirajn grupojn, agitis, enigis la malriĉulojn en la batalon. La someron de 1943 kune kun Slavi Aleksiev li partoprenis la organizadon de la partizana movado en la regiono de Plevan. Estis elektita ankaŭ kiel politika komandanto de unu taĉmento.

Post la sukcesaj partizanaj operacioj de lia taĉmento en la aŭtuno de la sama jaro la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio decidis elekti lin kiel sekretarion de la Distrikta Komitato de Laborista Junulara Unuiĝo. Cvetan jam preparis sin okupi tiun ĉi treege respondecan postenon, ligiĝis kun agantoj de la Unuiĝo en la vilaĝoj, altiris novajn membrojn, parolis ofte antaŭ specialaj kunvenoj pri la politika situacio. Sed iun tagon perfidulo rimarkis la rifuĝejon, kie estis Cvetan kaj Slavi, kaj montris ĝin al la faŝistaj agentoj. Du horojn pafis kaj kriegis la policianoj. Du horojn la du amikoj devis defendi sin kaj kaŝi ĉiujn

¹ Grupo de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo).

sekretajn materiaĵojn. Du — kontraŭ ducent. . .

Subite la pafado ĉesis. Aŭdiĝis kanto . . . Konsternitaj, la policianoj fiksis rigardon al la subtegmento de la domo, kie kaŝis sin Ĉvetan kaj Slavi. Vere, ili kantis . . .

— Pafu! Pafu, brutacoj! — kolere ekkriis al siaj policianoj la komandanto.

— Nin vi mortigos, sed miloj restos! — respondis Cvetan.

Denove silento. De la subtegmento la policianoj aŭdis du pafojn. Sed ne kontraŭ ili. Kio okazis? . . .

— Pafu, brutacoj! — denove ekkriegis la komandanto.

Pli ol horon pafis la policianoj. Neniu

kuraĝis alproksimiĝi. Kaj kiam finfine la komandanto ordonis al kelkaj agentoj sin traŝovi laŭ la postkorto, ili revenis paliĝintaj — la du komunistoj, por ne fali vivaj en iliajn manojn, estis sin mortigintaj. . .

Post kelkaj monatoj legendoj jam flugis tra vilaĝoj kaj urboj, ke Cvetan kaj Slavi estas vivaj en la montaro, ke ili kondukas la plej kuraĝajn taĉmentojn. Neniu deziris ekkredi, ke ili jam estas mortaj. Iliaj nomoj jam estis por ĉiuj standardo kaj simbolo de la proksima venko, de la brila mateniĝo, pri kiu batalis kaj kantis la du senmortaj amikoj.

Venelin Mitev

AL K-DO NEDELĈO NEDELĈEV — JAN

de David Ovadia

Ni lasis vin, eterne kie neĝ'
surŝutas ŝultron altan de l'montaro,
kaj vent' glacia hurlas sur ŝtonaro —
en teron metis vin ĉe nubsieĝ'.

Sur tombon flugos agloj el ĉiel',
funebros milda luno la bravulon. . .
Sen vi, ho Jan, al novatakoj, pluen,
laŭ vo,' taĉmenta iros ni al cel'!

Aŭrozas sur hajduta nask-Balkan'. . .
Pardonu vi, karul', pardonu, frato!
Revenos vi kun venko, sopirata,
revenos vi, karega Jan;

El bulgara: Ivan Batakiev

PENKA MIĤAJLOVA

Penka Miĥajlova estas naskita en 1914 en komunista laborista familio en urbo Teteven. Ĉe tre malbonaj kondiĉoj ŝi finis profesian lernejon. La malriĉeco de la familio en ŝia naskiĝurbo kaj la neestingebla deziro partopreni la aktivan batalon kontraŭ la monarkismo kaj kapitalismo igis ŝin serĉi laboron en Sofio. Ĉi tie la vivo ŝin hardis. Kiel konduktorino Penka aktive partoprenis la eksterlegan batalon de la tramlaboristoj. Kiel esperantistino ŝi aktive partoprenis ankaŭ la agadon de la Sofia E-Societo. BKP komisiis al ŝi gravajn taskojn inter la tramlaboristoj, sed la faŝista polico malkovris ŝin kaj sendis ŝin en koncentrejon „Krâsto

Pole“, apud Enikjoj. Tie ŝi senmaskigadis la faŝistan regadon, verkis poeziaĵojn, parolis malkaŝe pri la venko de la proletaro. Pro tio oni translokis ŝin en koncentrejon „Sankta Nikola“. Ankaŭ ĉi tie pro sia gaja karaktero kaj sociemo, pro siaj firmaj kompreno kaj kredo en la fina venko de la socialismo Penka lasis neforgeseblajn memorojn en siaj gekamaradoj.

Elirinte el la koncentrejo, ŝi fariĝis vendistino en magazeno. Kiam pro la bombadoj sofianoj amase forlasis Sofion, ŝi profitis la kreitan panikon kaj kune kun sia fratino Bona kaj kelkaj soldatoj el infanteria regimento forprenis grandan kvanton da armiloj, mu-



niciojn, kiujn poste ili havigis al partizana taĉmento „Ĉavdar“. La partia konferenco, okazinta sur Murgas, devigis Penka zorgi pri la provizado de la taĉmento, kiun taskon ŝi plenumis sukcese. Minacite de la faŝista potenco, ŝi kun sia fratino kaŝis sin en vilaĝon Sotoĉino, kie ŝi restis kelkan tempon kaj zorgis pri sia malsana eksterleĝa frato Todor. Sed perfidula animo denunciis Penka. La faŝistoj kaptis kaj turmentis ŝin plej kruele, sed nenium ŝi perfidis. Ne aŭdinte eĉ vorton de ŝia buŝo, ili translokis ŝin en vilaĝon Novoselci kaj poste en urbo Radomir, en la manojn de la plej kruelaj faŝistaj ekzekutistoj. Ankaŭ tie Penka nenion diris. Nek la rompitaĵoj kaj brakoj, nek la fortranĉitaj nazo kaj mamoj, nek la nehomaj torturoj igis ŝin diri eĉ unu perfidulan vorton. Laŭ plej kruela maniero ŝi estis mortigita en la loko Golo Bârdo, regiono de Radomir, la 9—10 de majo 1944.

Heroe mortis la fidela popola filino, fidela ĝis la lasta spiro. Ŝian amon al libero kaj socialismo ni portas ĉiam en niaj koroj, dum ni sindone konstruas la novan vivon kaj batalas por paco en la mondo.



E-Societo „Kulturo“ — Plovdiv, aranĝos LETERVESPERON je la 15. XII. 1969 okaze de la naskitĝago de Zamenhof. Respondo al ĉiu letero — almenaŭ per bildkarto — garantiita. (Ĉe deziro korespondi kun niaj membroj, ĉiu ricevos konvenan abreson).

Skribu al: E-Societo „Kulturo“, poŝtkesto 151, Plovdiv, Bulgario

PRI ESPERANTO

Международният език есперанто в тоя случай може да изиграе една завидна роля. Аз знам, че задачата на тоя език е по-голяма — тя е общочовешка, но нали чрез отделните народи, като се даде възможност на всеки да развие своите духовни сили и даде своите съкровища, ще се постигне общочовешкият идеал? Колкото повече връзките между народите, даже между най-отдалечените, благодарение на неимоверното развитие и усъвършенствуване на съобщенията стават

по-близки и по-наложителни, толкова и нуждата от международен език, от есперанто, става по-необходима.

Аз вярвам в бъдещето на есперанто, в неговото универсално разпространение, както вярвам в културата, чийто плод е тоя език и която, освободила човека от животинството и въпреки непредвидени завои и неочаквани падения, го води чрез международната солидарност към свобода, братство и мир.

Ник. Вас. Ракитин — поет

ORGANIZA VIVO

AL 4000 ABONANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“!

Nia asocia organo disponas pri papero por eldonkvanto de 4000 ekz. Bedaŭrinde ni neniam atingis tiun ĉi ciferon. Nia eldonkvanto estas ordinare inter 3200—3500.

Neniu dubas pri la grava rolo de nia organo kiel asocia propagandanto kaj organizanto, kiel grava faktoro por edukado de la bulgaraj esperantistoj kaj por plialtigo de ilia lingva nivelo, kiel informanto. Tial nia ĉiama tasko devas esti: la asocia organo eniru la manojn de ĉiu bulgara esperantisto — sekve, ĝia eldonkvanto konstante kresku.

Antaŭ ni en la momento staras tre grava kaj urĝa tasko:

ATINGI 4000 ABONANTOJN!

CK de BEA kaj la Redakta Komitato de „Bulgara Esperantisto“ alvokas ĉiun estraron de distrikta komitato kaj de E-societo mobilizi ĉiujn aktivulojn al varbado de abonoj, tiel ke ili superpasu sian pasintjaran abonkvanton!

CK de BEA kaj la Redakta Komitato alvokas ĉiun konscian bulgaran esperantiston aboni la asocian organon kaj nepre abonigi almenaŭ unu el siaj gekonatoj! Specialan zorgon havu la lektoroj de E-kursoj — ili abonigu ĉiujn siajn gekursanojn!

Ni starigas honoran

VERDAN TABULON.

Sur la Verda Tabulo aperos la nomoj de tiuj DK kaj societaj estraroj, kiuj abonigos almenaŭ 70% de siaj membroj!

Sur la Verda Tabulo aperos ankaŭ la nomoj de ĉiuj apartaj esperantistoj, kiuj kolektos almenaŭ 20 abonojn!

Sur la Verda Tabulo aperos la portretoj de tiuj, kiuj kolektos 40 abonojn!

Sur la Verda Tabulo aperos la nomoj kaj la portretoj de tiuj, kiuj kolektos pli ol 50 abonojn; ili ricevos ankaŭ premion de malfacile aĉeteblaj E-libroj kune kun unu honora senpaga jarkolekto de „Bulgara Esperantisto“!

Agu energie kaj sindone!

Agu senprokraste!

Ni nepre atingu 4000!

CELEBRADO DE POPOLAJ HEROJOJ

Okaze de la jubilea 25-a datreveno de nia kontraŭfaŝista revolucio la Distrikta E-Komitato en Pazarĝik celebris la 31-an de majo kaj la 1-an de junio 1969 la heroan morton en Velingrad de la partizanoj Angel Ĉopev, Stoju Kalpazanov kaj Vela Peeva.

Je la ekzekutlokoj flame parolis pri la geherooj k-do Manol Colev, prezidanto de la E-Societo en Velingrad. Per bonega belarta programo prezentis sin 32 geesperantistoj-lernantoj el dua gimnazio — Pazarĝik, kun gvidanto Petko Arnaudov, prezidanto de DK, kaj Janko Donkov. Deklamis la lernantinoj El. Nizamova, V. Ĥristova de Pazarĝik kaj Kr. Vasileva — Velingrad, kiu recitis la poemon „Kredo“ de ĉeĥa verkistino pri la partizano St. Kalpazanov. Pri li parolis lia eksinstruisto de Esperanto D. Peŝterski. La gelerntoj el Pazarĝik kantis esperantlingve partizanajn kantojn.

La aktiva kursgvidantino de Esperanto M. Kolĉakova (Velingrad) ankaŭ prezentis belartan programon kun siaj gelnantoj.

Pri la glora heroino Vela Peeva flame parolis la direktoro de la gimnazio en Velingrad Sp. Peeva. Oni faris multajn fotojn. Metitaj estis floroj antaŭ la monumentojn.

Rosica Georgieva

ESPERANTISTA RENKONTIĜO

Je la 26—27 de julio okazis renkontiĝo inter geesperantistoj el Plovdiv kaj Karlovo. Ni, plovdivaj esperantistoj, estis atenditaj de niaj gastamaj amikoj ĉe la stacidomo kaj tuj enloĝigitaj en turista dormejo de junpionira domo. Poste ni vizitis la akvofalon ekster la urbo, kie ni ĝuis belegan naturon. La vesperon ni havis amikan kuneston en restoracio kun komuna manĝo, multe da kantoj, ŝercoj, amuzado. Dimanĉe nia grupo vizitis la monumenton de l'apostolo de nia libero Vasil Levski kaj lian domon, nun muzeo.

Poste ni forveturis al Sopot, kie ni vizitis la domon-muzeon de Ivan Vazov, la monaĥejon, kie sin kaŝis Vasil Levski, la domon de Ivan Zagubanski — la kuraĝa kuriero de Lenin-gazeto „Iskra“ (Fajrero), la muelejon, priskribitan de Vazov en lia romano „Sub la jugo“.

Ni pasigis du plezurigajn tagojn, pro kiuj ni kore dankas al niaj kamaradoj el Karlovo. Tiu ĉi renkontiĝo ne estas la lasta. Nun ni atendas niajn amikojn en Plovdiv.

L. Karakaŝev

Partoprenu la Literaturan Konkurson de „Bulgara Esperantisto“! La limtempo: 1 de decembro 1969.

Vidu la kondiĉojn de la konkurso en „BE“ № 3—4 de 1969 j.





SLOVAKAJ PROGRESOJ

Post Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ankaŭ la nova Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko havis sian fandan kongreson — en Pribilina, de la 9-a ĝis la 11-a de majo, en Hotelo Esperanto.

Tiel do kompletigis la restrukturiĝo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, kiun postulis la politikaj ŝanĝoj en la lando, kaj la Internacia Movado turnas al ĝi siajn okulojn kun konfida espero pri estontaj gravaj atingoj.

Jam nun prezentigis bonaj faktoj: okaze de la 54-a Universala Kongreso aperis la unua eldono de nova publikaĵo „Slovakaj Novaĵoj“ ĉ. 50-paĝa. Per decido de la 17-a de februaro 1969 la estraro de Slovaka Akademio de Sciencoj jam aprobis la fondon de „Slovaka Esperanta Societo ĉe Slovaka Akademio de Sciencoj“. La Societo estas memstara scienca institucio aligita al la lingvo-scienca sekcio de SAS.

INTERŜANĜO PEJ—SEJU

La principo de la „Programo Pasporto“ de TEJO estas sendeviza interŝanĝo de gejunuloj. Oni povas apliki tiun ĉi principon ankaŭ rilate grupojn, ne nur unuopulojn. Tiaspecan ekzemplon donas la kontrakto pri sendeviza interŝanĝo, subskribita fare de la Pola Esperanto-Junularo kaj Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. Dek personoj el Svedujo povis vojaĝi al Pollando kaj partopreni interalie en la boata flotsado laŭlonge de la pitoreska rivero Brda en norda Pollando. Deko da polaj PEJ-aktivuloj vojaĝis al Svedujo por partopreni la Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Tyresö. Nova elemento en la menciita interŝanĝo estas la perado de la pola turisma vojaĝoficejo por la junulalo — „Juventur“.

BULGARIO FORTE IMPRESIS MIN

Ofte mi aŭdis pri la „Lando de la rozoj“ — Bulgario, kaj mi delonge deziris viziti ĝin. Bedaŭrinde longan tempon mi ne havis tiun ĉi eblecon. Subite mia bulgara korespondamiko sciigis al mi, ke en Pamporovo, Rodopi-montaro, okazos Esperanto-renkontiĝo. Mi tuj de-

GRAVAJ FORTIKIGOJ DE LA INFORMA AGADO

Legantoj de la usona „News Digest“ ofte forgesas, ke ĝi estas amatora produktaĵo. En konciza, ofsetita formo la bulteno prezentas la ĉefajn novaĵojn de la Esperanto-Movado al la neesperantista usona publiko. La dumonata eldonaĵo estas trafe redaktata, modele konforma al la plej altaj principoj de serioza informado pri Esperanto.

Ankaŭ la Esperanto-Junularo en GFR per sia eldonaĵo „Internacional“ plenumas similan taskon. Nun Sveda Esperanto-Junulara Organizo anoncis, ke ĝi eldonos svedlingvan bultenon kun nomo „Inter“. Komencis aperi en Italujo itala bulteno de Itala Esperanto-Junularo. Paralele kun tiuj ĉi evoluoj okazis konsiderinda ampleksiĝo de la Esperanto-agado de Pola Radio. La Radio nun elsendas pli ofte en Esperanto kaj pri Esperanto. Interalie, ĝi regulare brodkastas rubrikon pri junularaj novaĵoj, ĉefe pri TEJO kaj ties landaj sekcioj. Informojn kaj sonbendojn bonvolu liveri al Pola Radio (Esperanto-Redakcio), Varsovio. Kompreneble, unu el la ĉefaj fontoj por ĉiu ĉi informagado (kiel ankaŭ tiu de gazetoj kiel „Heroldo“) estas Novaĵoj-Nouvelles-News (NNN) de TEJO, ties propra novaĵbulteno.

UNIVERSITATAJ KURSOJ EN ĈILIO, FILIPINO, NEDERLANDO

El Latinameriko atingis nin agrabla novaĵo. Al modela agado de gejunuloj el Argentino, Meksikio, Brazilo, Kolumbio aldoniĝis ankaŭ gejunuloj el Ĉilio. En la Universitato de Santiago funkciis kurso de Esperanto por komencantoj. La kurson organizis tre vigla tiea junulara grupo, sub gvido de Margarita Cruz.

El tute alia mondparto, nome el Filipinaj Insuloj, ni ricevis informon, ke 200 studentoj studas Esperanton en la Kolegio Zaragoza, en Tayug, Pangasinan. La TEJO-sekcio en Nederlando, NEJ, informas, ke lekcionoj en Esperanto rekomenciĝis en la Universitato de Amsterdam sub instruado de f-ino A. J. Middelkoop.

TEJO-novaĵoj, № 8/1969

cidis partopreni ĝin por havi tiamaniere eblecon konatiĝi kun la bulgara popolo kaj ĝiaj kutimoj.

Kun mia edzino ni flugis de Berlino al Sofio, kien ni alvenis nokte. Nekonataj bulgaraj homoj, scipovantaj la germanan lingvon,

helpis nin por atingi la stacidomon. La unua mia impresio estis, ke la bulgaroj estas afablaj kaj helpemaj homoj. En Plovdiv nin atendis mia E-amiko Kurtev el urbo Marica. Li akompanis nin kaj montris al ni la belan urbon, bone flegitan kaj puran. Poste ni veturis per aŭtobuso al Pamporovo. Tie ni havis en montodomo „Studenec“ por dudek tagoj novan hejmon inter geesperantistoj. La bulgaraj gesamideanoj, kiuj akceptis nin, estis treege helpemaj. Bedaŭrinde ni tie trovis neniun signon, ke ĉi tie okazos E-kursoj. Oni instigas la esperantistojn: semu ĉie Esperanton! Kaj en Bulgario ekzistas forta E-Movado kun multaj kunlaborantoj. Do, devas esti pli facile montri ankaŭ al neesperantista publiko, ke ĉi tie okazas E-renkontigo.

La manĝaĵo por ni, germanoj, estis tute alia, fremda. Tamen mi devas diri, ke ĝi estis bongusta kaj mi perdis eĉ ne unu kilogramon de mia korpa pezo! Krome mi sentis min tre sana, certe pro la ne tro grasa manĝaĵo, kiel en mia lando, kie ni manĝas tro multe da viando kaj kolbasoj.

Kiaj estis miaj imagoj antaŭ la vojaĝo al Bulgario? Ke mi trovos ĉi tie homojn, kiuj estas same pacamikoj kiel ni en GDR. Kaj ĉu mi vere trovis ilin? Jes, ĝis la lasta momento neniun malravis min! Ni, esperantistoj, estas pacbatalantoj, humanaj homoj, fidelaj al la ideoj de Zamenhof.

Kelkajn vortojn mi deziras diri ankaŭ pri la E-instruado en la montodomo „Studenec“. Ŝajnas al mi, ke la tre praktika metodo, la simpla klarigo de la gramatikaj problemoj fare de la kursgvidantoj k-doĵ Kunĉo Vălev kaj Georgi Dimov estas tre bonaj kaj kompreneblaj. La instruado estas tre vigla, kaj oni ofte ŝanĝas la temojn. E-kantoj pliriĉigas la instruadon kaj plezurigas la lernadon. Mi nur povas danki al la Distrikta Komitato en Smo-

ejan, ke ĝi aranĝis E-kursojn en Pamporovo. Kaj mi esperas, ke estontjare venos pli da esperantistoj el diversaj landoj. Dankon ankaŭ al ambaŭ kursgvidantoj kaj al ĉiuj, kiuj helpis, ke nia studado kaj restado tiel bone sukcesis!

Post la kursoj en Pamporovo ni havis eblecon, akompanataj de niaj bulgaraj amikoj esperantistoj, viziti ankaŭ la Nigran Maron, Burgas, Nesebr, Sofion, la monton Vitoŝa. Ĉie ni estis ravitaj de belega naturo, multaj vidindaĵoj, afablaj bulgaraj homoj. Sed tio, kio plej mirigis nin ĉie, estis la grandioza konstruado: oni povus diri, ke la tuta lando estas rekonstruita — ĉie vidiĝas novaj loĝdomoj, oficejoj, uzinoj, fabrikoj, fervojstacidomoj. En multaj vilaĝoj oni preskaŭ ne povas renkonti eĉ unu malnovan konstruaĵon. Tiel rapide konstrui oni povas nur ĉe la socialismo. Nesebr kun „Suna Bordo“ estas vera juvelo! Mi ĉiam pensis: se ankoraŭ ekzistis kapitalismo en Bulgario, neniam oni estus konstruinta ĉion ĉi. Kaj la plej grava: nun ĉio apartenas al la popolo, ne al privatuloj-eksploatantoj. Al mi kiel inĝeniero specialan impreson faris la grandega nova Naftkombinumo apud Burgas. Mi devenas el teknika lando kun granda industrio, sed mi sincere diras, ke la Naftkombinumo apud Burgas imponis forte ankaŭ min per siaj grandeco kaj moderneco.

Mi fidis plene al la bulgara popolo kaj mi esperas, ke ĝi ankaŭ estonte rapide progresos ĉiufanke kaj altigos konstante sian vivnivelon en daŭra paco. Kun ĝojo ni hejmenveturas en konscio, ke en Bulgario ni trovis novajn amikojn, kun kiuj ni kune kaj fidele batalas kaj batalos por paco kaj feliĉo en la mondo. Bulgario kaj ĝia popolo restas por ĉiam en niaj koroj.

Werner Plate, Rostock, GDR

LINGVAJ DEMANDOJ

La simpla gramatiko de Esperanto ebligas al ĉiu ellerni kaj memori en mallonga tempo la relative nemultajn finaĵojn, kiuj donas formojn al la gramatikaj kategorioj (substantivo, verbo en diversaj tempoj, adjektivo ktp.) kaj difinas ties signifon. Sed kiam oni komencas kombini en propozicio tiujn formojn, ofte aperas devioj, kiuj konfuzas la klarecon de la penso. Tiaj devioj estas ŝuldataj ordinare al influo de la sintakso de la propra nacia lingvo. (Tiajn deviojn ni povas rimarki ankaŭ

POR BONA UZADO DE LA INTERNACIA LINGVO

PEKOJ KONTRAŬ LA SINTAKSO

ĉe la uzado de ĉiu ajn alia fremda lingvo fare de personoj, kiuj komencas apliki siajn konojn).

Ni vidu la plej karakterizajn deviojn, faratajn de bulgaraj esperantistoj.

Akuzativo

1. Plej ofta eraro estas neuzado de akuzativo en okazoj, kiam ni devas esprimi la diferencon inter aganto kaj objekto de la ago (inter subjekto en propozicio kaj objekto). En multaj lingvoj — same en nia bul-



gara — tiu ĉi diferenco ne estas esprimata per specialaj gramatikaj formoj. Pro tio novaj esperantistoj malrapide kutimiĝas al uzado de la akuzativo en funkcio de objekto, kvankam en la teoria lernado ili komprenas klare ĝian signifon. Pasas tempo — pli aŭ malpli longa — ĝis oni akiras senton pri ĝia esenco kaj kutimon apliki ĝin, t. e. ne forgesi, ke se *mi legas libron, do la libro ne legas min.*

Se por substantivoj (kaj adjektivoj) en bulgara lingvo ne estas speciala diferenciga formo por la montritaj vortospecoj, tamen por pronomoj tia ekzistas: аз — мене, ме, ти — тебе, те, той — него, ro kaj pri ĝia uzado oni neniam faras erarojn. Ankaŭ en Esperanto neniu bulgara esperantisto faras erarojn pri la akuzativa formo ĉe uzado de pronomoj kaj neniam intermiksas *mi kaj min (vi kaj vin ktp.)*. Jen tio povas doni kontrolilon pri uzado de la akuzativa formo ankaŭ en kazoj, kiam en la propozicio staras ne pronomo, sed respektiva substantivo:

Mi komprenas via penso — ĉu *ĝi* aŭ *ĝin* mi komprenas? — Sendube *ĝin*. Do, ankaŭ *via penso* devas esti en la sama formo: *Mi komprenas vian penson.*

En ordinara parolado ni povus indulgi eraran neuzon de akuzativo, sed en skribado ĝi ne estas pardonebla. Kaj tie ĝi estas pli facile kontrolebla kaj evitebla: relegante sian skribaĵon, ĉiu povas — per la montrita kontrolilo (ĉu *ĝi* aŭ *ĝin*) vidi sian eventualan eraron kaj korekti ĝin.

Ne malpli grava eraro estas uzado de akuzativo tie, kie ĝi ne esprimas aganton (t. e. starigado de subjekto en akuzativa formo): *Niajn membrojn pagas regule kotizon.* (Ĉu ilin aŭ ili pagas?) Pri eraroj de tiu speco Zamenhof skribis: „Ĝia uzado (de la akuzativo) en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol neuzado en okazo de bezono.“

Kiam oni akiris senton pri la esenco de la akuzativo (kiu estas la aganto),

tiam ankaŭ la okazoj de ĝia erara uzo malaperos.

2. Relative malpli oftaj eraroj estas rimarkataj rilate la uzadon de akuzativo esprimanta direkton de movo. Ankaŭ pro tio estas necese akiri senton pri ĝia esenca signifo: per la akuzativo ni esprimas, ke io transiras en lokon aŭ staton (pozicion), en kiu ĝi ne estis antaŭ tio:

Mi kuris en la ĝardeno — Mi kuris *en la ĝardenon.*

Oftaj hezitoj kaj duboj okazas, kiam la parolo estas pri abstraktaj statoj:

Subita penso venis *en mian kapon* (la penso ja ne estis en la kapo antaŭ tio).

Sed mi devas emfazi, ke en iuj kazoj oni povas egale bone uzi nominativon aŭ akuzativon:

Neniu ĝis nun penetris *en tiu loko/ en tiun lokon.*

Neado

1. Ofta eraro estas duobla neo:

Neniu ne venis. Mi *neniam ne* forgesos vin.

Tie ĉi la influo de la nacia lingvo ofte venkas la korektan esprimadon en Esperanto (malgraŭ klaraj avertoj en la lernolibroj); korekte estas diri:

Neniu venis. Mi *neniam forgesos vin.*

2. Erara estas ankaŭ uzado de *nek*, kiam en la propozicio ĝi estas sola nea vorto: *Nek unu virino* ĉeestis — Нито една жена не присъствуваше, anstataŭ la korekta: *Eĉ unu virino* ne ĉeestis. Mi havas *nek unu levon* — anst.: Mi ne havas *eĉ unu levon.* *Nek* ni rajtas uzi, kiam ni neas pli ol unu aferon: *Nek mi, nek mia amiko* povas veni. Mi ne venos, *nek intencas veni.* Se estas neata nur unu afero, ni devas uzi *eĉ ne*, sed *ne nek.*

Не само, но и . . .

Sub influo de la bulgara lingvo kelkaj samideanoj erare uzas por tiu ĉi bulgara esprimo en Esperanto *ne nur, sed kaj*. . Korekte en tiu ĉi okazo estas diri *ne nur, sed ankaŭ*, ekz. Mi

ne nur estimas, *sed kaj* amas lin —
 Az не само го уважавам, но го и
 обичам. Korekte estas diri: Mi *ne nur*
 estimas, *sed ankaŭ* amas lin. Por la
 celo oni ne devas traduki laŭvorte na-
 ciajn esprimojn, sed akiri senton pri
 la specifa signifo kaj uzo de la apar-
 taj vortoj.

Da

Mi havis okazon aŭdi eĉ el la buŝo
 de bonaj esperantistoj esprimojn kiel
 la jenajn:

Tridek mil *da* loĝantoj. Kvinmil *da*
 spektantoj.

Tie ĉi *da* estas uzata malkorek-
 te. Post nombraj *numeraloj* oni
 ne povas uzi ĝin: kiel ni diras
tri viroj (kaj ne tri *da* viroj), tiel ni
 devas diri *trimil*, *tridek mil* ktp.
viroj. Nur se ni substantivigos la
 numeralon (trio, trimiloj, tridek miloj),
 ni jam devas uzi *da*: *tridek miloj da*
loĝantoj; *kvin miloj da* spektantoj.

Infinitivo kaj volitivo

Jen kiaj malkorektaj esprimoj estas
 rimarkataj:

Estas tempo *ni komenci* — Време е
 да започнем. Estas necese *la societo al-
 paŝi al...* — Необходимо е дружеството
 да пристѣпи към. . . Ĉu estas eble *pli
 multaj personoj partopreni* la ekskur-
 son? — Възможно ли е повече лица
 да участвуват в екскурзията?

Korekte estas uzi ne *ni komenci*,
 sed: *ke ni komencu* (anstataŭ infini-
 tivo komenci — volitivo komencu, en
 konstruo *ke + ... u*¹). Same: *ke la societo
 alpaŝu al...*, *ke pli multaj personoj
 partoprenu...*

Tamen eraro estos ankaŭ uzi
ke + ... -i: *ke ni komenci*. Ankaŭ tiu ĉi
 eraro estas rimarkata ofte.

Ĉe sensubjektaj² verboj la

¹ Per tiu ĉi konstruo Esperanto esprimas la
 subjunktivon de aliaj lingvoj.

² La tradicie uzata termino „senpersona“
 verbo ne estas ĝusta; fakte en la lingvoj, en
 kies gramatiko oni uzas ĝin, la verboj havas
 personon (la 3-an formale), sed mankas
 subjekto.

konstruo *ke + ... -u* ne estas
 uzata; tie ĉi simpla infinitivo sufiĉas
 kaj estas korekta:

Estas tempo *komenci* — Време е
 да се започне.

Estas *necese alpaŝi al* — Необхо-
 димо е да се пристѣпи към. . .

Sed se ni metos kiel subjekton la
 senpersonan pronomon *oni*, ni jam
 devas uzi *ke oni...* — *u*: *ke oni ko-*
menclu, *ke oni alpaŝu*.

Nenecesa kompleksa verboformo

Temas pri uzado, kiu gramatike
 ne estas erara, sed stile estas peza
 kaj nerekomendinda. En bulgara lingvo
 ni sentas diferencon en la signifoj de
 jenaj esprimoj:

Ходил ли си в Пловдив? Ходи ли в Пловдив?
 Чел ли си „Под игото“? Чете ли „Под игото“?
 Досега несъмн виждал Досега не видях море
 море.

La verboj en la du kolumnetoj es-
 primas saman agon, sed estas nuan-
 co en la signifo de ties plenumiĝo: en
 la maldekstra kolumno ili entenas ideon
 pri ĝenerale farata ago sen konkreteco
 pri la tempo (momento) de la faro:
 Ĉu vi ĝenerale (iam) vizitis la foiron
 de Plovdiv, ktp. En la verboj de la
 dekstra kolumneto ni sentas jam kon-
 kretecon (ligitan kun supozata momen-
 to, ordinare pli proksima).

En la aliaj lingvoj tian nuancan di-
 diferencon ni ne trovas. Ankaŭ Esperan-
 to ne konas ĝin. Sed la bulgaraj espe-
 rantistoj, sub forta influo de sia nacia
 lingvo, ĉiam estas inklinaj traduki la
 propoziciojn de la speco de la mal-
 dekstra kolumno jene:

Ĉu vi estas vizitinta la foiron de Plovdiv?

Ĉu vi estas leginta „Sub la jugo“?

Ĝis nun mi ne estas vidinta la maron.

Tiuj ĉi esprimoj faras strangan imp-
 reson al alinaciaj esperantistoj.

La kompleksaj formoj de la verbo
 (*estas...-inta*) estas al ili nekutimaj
 kaj nenecese uzitaj, pezaj, rompantaj la
 simplecon. Nature en Esperanto oni
 devus diri en la montritaj okazoj:



GALUNKA

Fabeleto de Mihail Ĉobanov

Malproksime, malproksime sub unu montaro kuŝis bela verda herbejo, kaj preter ĝi, ĝis kie atingis la rigardo — maljuna verda arbaro. Sur tiu herbejo, proksime de la arbaro, staris malgranda dometo kun blankaj-blankaj muroj kaj ruĝa-ruĝa tegmento.

Tie loĝis Galunka, kvinjara knabineto. Ŝia patro estis arbargardisto, kaj ŝia patrino — dommastrino. Aliaj homoj tie ne loĝis. Nur la hundo Ŝaro estis granda amiko de Galunka. Sed ĉi-tage la hundo iris kun ŝia patro en la arbaron.

La pordo de la domo malfermiĝis kaj sur la sojlo ekstaris Galunka — en

verda robeto, kun blanka ĉapeleto sur la kapo, kun flavaj-flavaj sandaletoj. En la manoj ŝi havis novan korbeton. Je disiĝo, ĉe la doma sojlo, ŝia panjo diris:

— Ĉu vi komprenis, Galunka? Marŝu ĉiam laŭ la vojeto kaj enirinte la arbaron, vi vidos etan herbejon. Tie vi trovos fungojn. Hieraŭ pluvis, hodiaŭ la suno brilas — certe multaj fungoj kreskis, do plenigu la korbeton kaj rapide revenu. El la fungoj ni preparos bongustan manĝaĵon.

— Mi scias, mi scias, panjo — diris Galunka, rapide trakuris la korton kaj direktiĝis al la arbaro.

Ĉu vi vizitis la foiron de Plovdiv?

Ĉu vi legis „Sub la jugo“?

Ĝis nun mi ne vidis la maron.

En recenzo pri la libro „Bulgara prozo“ (en „Nuntempa Bulgario“, 1961, pĝ. 11) la rusa samideano Genadij Zaljotov, laŭdante la lingvaĵon de la tradukoj kaj emfazante, ke „oni povas paroli pri speciala bulgara Esperanta skolo, kies modeloj estas sekvindaj ankaŭ por alinaciaj Esperantaj lingvo-kulturantoj“, aldonas daŭrige:

„Kiel iom negativan apartaĵon de la ‚bulgara skolo‘, oni povas noti kelkan trouzadon de la kompleksaj aktivaj verboformoj. La formoj *estas* ...—*inta* en plejparto de okazoj povas esti anstataŭigitaj per la simpla *is-formo* sen perdo de klereco kaj de ĝusta koncepto pri sinsekvado de la agoj. Pro kio senbezone forrifuzi la genian simplecon de la Zamenhofa konjugacio? Tiuj kompleksaj formoj havas aspekton ne tre belan kaj sonas ne agrable.“

Alia samideano iam esprimis supozon, ke la bulgaroj uzas tiel ofte la formon *estas* ...—*inta* sub influo de la franca(?)

lingvo. Nu, influo sendube estas, sed ja ĝuste de la bulgara lingvo.

Tamen tiujn avertojn oni ne akceptu en absoluta senco. Estas okazoj, kiam la kompleksa verboformo *estas* (aŭ *estis*) ...—*inta* en Esperanto havas pravigon, ekzemple: Kiam mi atingis la stacidomon, la vagonaro *estis forveturinta*. Kie ni devas klare esprimi sencon de pluskvamperfekto, la montrita kompleksa formo estas necesa. Nin gvidu ĉiam la senco kaj la principo de neceso kaj de sufiĉo.

Multaj bulgaraj esperantistoj ofte turnis sin al mi en diversaj tempoj kun peto pri iuj lingvaj klarigoj. Por mi tio ĉi ĉiam estis pruvo pri la efektiva strebado de niaj samideanoj atingi perfektan scion kaj spertiĝon en la uzado de la Internacia Lingvo. Al ili nome mi dediĉas ankaŭ la jenajn prilingvajn klarigojn kun varma deziro, ke tiu ĉi laŭdinda strebado kaj ambicio al perfektigo ekkaptu ĉiam pli multajn bulgarajn esperantistojn.

A. D. Atanasov — ADA

Baldaŭ ŝi atingis la herbejon, pri kiu estis parolata ŝia patrino, kaj tuj komencis serĉi fungojn. Subite en la arbustoj io ekmoviĝis. Galunka ekstimis — ĉu tio ne estas serpento? Ne, nur granda maljuna testudo. Galunka proksimiĝis al ŝi kaj diris:

— Avino Testudo, ĉu vi scias, kie mi povus trovi fungojn?

La testudo ne povas paroli, sed per kapgesto ŝi montris la direkton. Galunka vidis, ke tie, kien ŝi montras, estas freŝaj belaj fungetoj.

— Mi dankas al vi, avino Testudo, — diris Galunka kaj tuj komencis kolekti ilin. Duone pleniginte la korbeton, ŝi komencis serĉi okzalon, sed nenie ŝi vidis de ĝi.

Galunka iris al la arbusto, kie ankoraŭ estis la testudo, kaj diris:

— Mi dankas al vi, avino Testudo, pro la fungoj, sed mi devas kolekti ankaŭ okzalon kaj nenie mi vidas de ĝi. Ĉu vi scias, kie mi povus trovi okzalon?

La testudo ne povas paroli, sed per kapgesto ŝi montris la direkton. Galunka vidis, ke tie estas freŝa verda okzalo.

Sed nur post kelkaj minutoj Galunka denove revenis kaj dolĉe ekparolis al la maljuna testudo:

— Mi tre dankas al vi, avino Testudo, pro la fungoj kaj la okzalo. Nun al mi restas kolekti nur fragojn. Se vi helpas min trovi fragojn, mi neniam forgesos vian bonecon.

La testudo ne atendis longe. Ŝi tuj mallevis sian rigardon de Galunka kaj turnis ĝin al la arbusto. Galunka tuj ĉirkaŭiris la arbuston kaj vidis multe da fragoj, ruĝaj kaj aromaj. Ŝi kolektis la plej grandajn, la plej ruĝajn, metis ankaŭ ilin en sian korbeton kaj direktiĝis al la testudo por danki al ŝi.

— Mi tre-tre dankas al vi, avino Testudo, — diris Galunka, kliniĝis, karesis ŝian krustoŝelon kaj ekiris malrapide al sia domo. Sed elirinte el la arbaro, ŝi

vidis, ke ankaŭ avino Testudo marŝas post ŝi.

Galunka kriis:

— Panjo, panjo, vidu, kiu venas post mi!

Kiam la patrino aperis, Galunka malfermis la pordon kaj rakontis kiel avino Testudo helpis al ŝi trovi fungojn, okzalon kaj fragojn. La testudo atendis senmove ĉe la pordo kaj aŭskultis.

La patrino de Galunka gaje diris:

— Galunka, filineto mia, kial vi atendas, invitu avinon Testudon gastigi al ni.

Ĝoje ridetante, Galunka malfermis la pordon kaj diris:

— Kara avino Testudo, mi tre ĝojas vidi vin denove, bonvolu gastigi al ni! Ni petas vin!

La testudo eniris la korton kaj haltis sur la verda herbejo.

La patrino de Galunka alportis du teleretojn — en unu estis lakto, kaj en la alia — mielo. Ŝi metis ilin antaŭ la testudon. Avino Testudo ekrigardis unue al Galunka, poste al ŝia patrino kaj dolĉe dolĉe ekmanĝis. Manĝinte ĝis plena satiĝo, ŝi dankis unue al Galunka, poste al ŝia patrino kaj ekiris returnen al la pordo. Galunka akompanis ŝin ĝis la arbaro kaj diris:

— Ĝis revido, avino Testudo, mi tre dankas vin pro ĉio!

— Ankaŭ vi estas tre bona, Galunka — diris la testudo nur per rigardo. Ĉar ŝi ne povas paroli per lango, kaj ekiris returnen.

Solvo de problemoj

Nº 1 de „BE”: Preseraroj

arbon — urbon, vostojn — vestojn, kapojn — ĉapojn; peto — reto; flosoj — flokoj; fokoj — rokoj; plando — planko.

Nº 2 de „BE”: Vortludoj

tempera-turo, e-tero, mas-aĝo, sop-rano, profilo, hon-oro, ĉam-pano.



MI NE ESTAS EL SUKERO

Pluvas kvazaŭ el sitelo.
Mi ne estas karamelo, —
ne degelos pro l' veter'!

Sub piedoj tero ŝmacas.
Kur' subpluva al mi plaĉas, —
mi ne estas el suker'!

Ljudmila Jevsejeva, Riga

NIAJ GRATULOJ

* *Geedziĝis k-no Elzbieta Kotecka (Pollando) kaj k-do Bojdar Leonov el Karlovo—prezidanto de Studenta E-Ligo (SIELO).*

Ni tutkore bondeziras ĉiufankajn sukcesojn kaj multan feliĉon al la juna Esperanto-familio!

* *Je la 4. IV. 1969 en Pazarĝik la Esperanto-familio de Ljudmila Kolmakova (el USSR) kaj Petko Arnaudov pligrandiĝis per dua filo — Viktor.*

Niajn tutkorajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj!

Ĝus aperis la libro „ELEKTITA VERKARO“ (versaĵoj kaj felietonoj) de Ĥristo Botev, tradukis Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov, redaktis Ĥristo Gorov, eldonis Sofia-Press, liveras Bulgara Esperantista Kooperativo, str. Neofit Rilski 18, Sofio. Prezo 1,58 lv. Faru viajn mendojn al la Kooperativo.

La 1-an de aŭgusto mortis post kelkmonata grava malsanado la fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj kortega konsilisto

HUGO STEINER

en sia 92-a jaro. Li estis Honorprezidanto de la Unuiĝo „Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno“, Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, Honora Prezidanto de Aŭstria Esperanto-Movado, Honora Prezidanto de Aŭstra Federacio Esperantista Fervojista kaj honormembro de multaj aliaj organizoj. Li posedis la Honormedalon de ICK, la Aŭstrian Honor krucon por Scienco kaj Arto kaj diversajn aliajn en- kaj eksterlandajn distingojn.

Lian memoron ni gardos por ĉiam kun amo!

Internacia Esperanto-Muzeo

CK de BEA kaj la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ esprimas siajn kondolencojn al la funebrantaj gefamilianoj kaj la esperantistoj en Aŭstrio!

Je la 10 de aŭgusto 1969 forpasis tute subite en sia 73-a jaro la honorprezidanto de la Poŝtista E-Societo en Sofio



DIMITR KARAGJOZOV

Naskita en Sevlievo en malriĉa familio, li de sia infanaĝo ekkonis la malĝojon. Esperantisto Karagjozov fariĝis jam en la lernejo. Pli ol 50 jarojn li fordonis sin al sia amata internacia lingvo, gvidinte multajn E-kursojn en Sevlievo, Asenovgrad, Sofio kaj aliloke. Por Esperanto li ĉiam laboris fervore kaj sindone. Centoj da esperantistoj eniris la E-Movadon dank' al lia bonega talento de agitanto kaj kursgvidanto. Bonkora, honesta kaj helpema ĉiam kaj al ĉiuj, Karagjozov ricevis estimon kaj amon de ĉiuj. Pro lia morto nia Movado perdas unu meritan aktivulon, kiu ĝis sia lasta spiro laboris por Esperanto.

Eterna estu la memoro pri la sindona esperantisto kaj pachtalanto Dimitr Karagjozov pri lia modela E-agado kaj vivo!

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Iv. Sarafov

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

La 19-an de julio forpasis la aktiva E-aganto

PETR KAMBUROV

longjara sekretario de la E-Societo en v. Proslav, distrikto de Plovdiv.

Naskita en Stara Zagora en 1900, li de 1930 estas esperantisto kaj sian postan vivon dediĉis al Esperanto. Petr Kamburov estis kursgvidanto en Jambol, Gabrovo, St. Zagora, Sevlievo, Kazanlâk, Plovdiv. Li estis ankaŭ kunlaboranto de lernolibro de Esperanto. Per sia viclono dum ĉiu E-renkontiĝo kaj kunveno ĝis la lastaj tagoj de sia vivo li plezurigis la esperantistojn. P. Kamburov lasis bonegajn rememorojn en ĉiuj, kiuj lin konis.

Niajn kondolencojn!

Je la 17 de julio j.k. pereis neatendite ĉe akcidento nia longjara aktiva kamarado-esperantisto

GEORGI HR. BELEV

naskita en 1907 en v. Balanovo, distrikto de Kjustendil. Filo de malriĉa multmembra familio, li ne havis eblecon ricevi altan instruitecon. Lia vojo al pli vasta kulturo estis la memklerigo. Ankaŭ Esperanto, kiun li lernis en 1925, helpis bone lin. Veninte baldaŭ Sofion kiel laboristo, Belev eniris la progreseman movadon kaj fariĝis membro de BKP, kies danĝerajn taskojn li plenumis multfoje.

Post la popola venko je 9. IX. 1944 Belev aktive partoprenis la konstruadon de la socialismo en nia lando.

En 1945 li fariĝis membro-fondinto de Bulgara Esperantista Kocperativo kaj poste longjara membro de ĝia gvida estraro.

Laborema, modesta, bonkora kaj ĉiam bonhumora optimisto, GEORGI BELEV vekis estimon kaj amikecon en ĉiuj kiuj kontaktis kun li.

Niajn kondolencojn al lia funebranta familio!

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Stilian Tonĉev (19-jara), Aleksandrovo, okr. Loveĉ, kolektas ankaŭ gramofondiskojn.

Kiro Delĉev, popola kuracisto, str. Georgi Dimitrov 38, Svilengrad, deziras interŝanĝi drogojn kaj konsilojn pri kuracado.

Ĉeĥoslovakio

Rudolf Ullrich, 60 X C7, Pardubice.

Hungario

Johano Galambaš, str. 19 Engels, Pecs.

Pollando

Jerzy Piechowiak (30-jara), ul. 3 Maja 16/4 Bydgoszcz (pri turismo, filmoj).

Malgorzata Dudziak (17 j., lernantino), Wolsztyn, ul. Marchlewskiego No 9 woj. Poznańskie — pri geografio, historio, junulara vivo, fremdaj lingvoj (Esperanto, rusa, franca, germana).

Josef Lubeski (25-jara, teknikisto), Chorzow, str. Lompy 6-a m 14.

Zboralski Bogdan (16-jara), Babinost, ul. Wolsztanska 211 — pm, gramofondiskojn.

Nova adreso: Jerzy Uspienski, Varsovio 1, str. K.R.N. 1 m 41.

Tereza Gziedzic, 22-jara, Cieplice sl. Devoj ul. Wiejska 25 pow. Jelenia Gora.

Rumanio

Anoj de E-klubo, komuna adreso: Esperanto-klubo „Nova Vojo“, Remetea, depart. Haraĥita.

Sovetunio

Demidov Vjaĉeslav (20 j., studento), Novosibirsk 15, pr. Dzerĵinskij 10/2 — pri estrada muziko, pk k.a.

Vasilkovskij Vjaĉislav, Kiev-1, Do vostrebomanija (pri paco, estonteco).

Paškeviĉ Juna (28 j. ing.-ekonomiisto), ul. Krasnogvardejskaja 40, Zaporozĵje — 55 — kun ĉi pri ĉi.

Hmelevskij Leonid, 3 Sverdlova 7, Sumskoj oblasti, Konotop.

Sumanov Viktor (31 j. inĝeniero), Krasnojarsk; poŝtkesto 23 — pri insignoj kaj V. I. Lenin.

Lit. SSR, Vilnius 9, abon. p. d. № 278, Vytautas Mukas.

Lit. SSR, Palanga, Sporto 2, Albertas Vaiĉius — kun ĉi, precipe Koreo, Libio.

Lit. SSR, Vilnius, str. Ĵirmunu d. 83 kv. 30, Serdjukova Larisa.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Lvovo d. 26 kv. 11, Curukov Kolija.

Lit. SSR, Vilnius, str. Dzerĵinskij d. 162 kv. 58, Ivanova Ljuda.

Lit. SSR, Vilnius, str. Verkiu d. 5 kv. 8, Ipatenko Lena.

Lit. SSR Vilnius-5, str. Lvovo d. 11 kv. 25, Busloviĉ Vadim.

Lit. SSR, Vilnius, str. Vikinto d. 15/11 kv. 1, Zavodnik Leo.

Lit. SSR, Vilnius, str. Ĵirmunu d. 51 kv. 42, Baĥareva Vera.

Lit. SSR, Vilnius, str. — Stepo — Zuko d. 2/28 kv. 21, Blazenova Ira.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Aluntos d. 8/5 kv. 3, Derošina Ljuda.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Lvovo d. 33 kv. 5, Jarmoloviĉ Lila.

